

Enhavo

1	Detlev Blanke (1941–2016)	2
1.1	Vivo kaj Agado	2
1.2	Publikigaĵoj de Detlev Blanke	3
2	Interlingvistiko kaj Esperanto en Universitatoj	6
2.1	Buchanan-prelego	6
2.2	Esperanto-kursoj kaj kursoj pri interlingvistiko en universitatoj	7
2.3	Novaj magistrasaj studoj interlingvistikaj ĉe UAM en Poznano	7
3	Internaciaj aranĝoj	8
3.1	101-a UK en Nitro: Lingvopolitika Simpozio	8
3.2	101-a UK en Nitro: Esperantologia Konferenco	8
3.4	101-a UK en Nitro: Internacia Kongresa Universitato	10
4	Publikigaĵoj	11
4.1	Aktoj de la 25-a jarkunveno de GIL (Beiheft 23)	11
4.2	Gazzola kaj Wickström pri ekonomiko de lingvarpolitiko	12
4.3	Aliaj publikigaĵoj	14
5	Pri la estonteco de <i>Ipl</i>	14

1 Detlev Blanke (1941–2016)

1.1 *Vivo kaj Agado*

(Sabine Fiedler kaj Cyril Brosch en la nomo de la estraro de GIL)

La 20-an de Aŭgusto 2016 forpasis la longjara prezidanto kaj fine honora prezidanto de Societo pri Interlingvistiko (GIL, Germanio), estrarano de Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) kaj redaktoro de *Informoj por Interlingvistoj*, Dr. sc. Detlev Blanke. Kiel neniu alia li influis la evoluon de interlingvistiko kaj postlasis breĉon, kiun plenumi aperas preskaŭ neeble. La multnombraj nekrologoj en la gazetaro kaj fakaj ĵurnaloj germanaj kaj internaciaj pruvas la konsternegon, kiun kaŭzis lia morto, sed samtempe liajn elstarajn atingaĵojn por interlingvistiko, lian daŭran subtenon por kaj grandaj kaj malgrandaj projektoj kaj ankaŭ lian kamaradecan sintenon kaj homajn kvalitojn, kiujn homoj en tiu momento rememoris. En tiu ĉi nekrologo ni intencas memori kelkajn staciojn el lia vivo kaj honori liajn elstarajn meritojn.

Detlev Blanke naskiĝis en Neumünster en Germanio la 30-an de Majo 1941. Post la abiturienta ekzameno en 1959 li studis en la Universitato de Rostock kaj poste laboris kiel instruisto pri la germana lingvo kaj geografio en supera lernejo in Dorf Mecklenburg (ĉe Wismar), en Germana Demokratia Respubliko. Jam en 1957 li memstare lernis Esperanton kaj iom pli poste komencis prelegi pri tiu planlingvo kaj verki artikolojn por ĵurnaloj. En 1964 en Rostock li organizis la unuan interlingvistikan seminarion en universitato de GDR. De 1968 ĝis 1990 Detlev Blanke estis sekretario de Centra Laborrondo Esperanto en la Kulturligo de GDR (ekde 1981 Esperanto-Asocio, GDREA). Dum la tempo de lia agado la Asocio fariĝis parto de internaciaj strukturoj, oni sukcese kombinis organizan laboron kun faka agado kaj tiel atingis certan sciancon rekonon por la planlingvo en GDR. De 1970 ĝis 1990 Detlev Blanke redaktis la revuon *der esperantist*. Kiel vicprezidanto de GDREA en Majo 1991 li kontribuis al senkonflikta kaj egalrajta unuiĝo de la du germanaj Esperanto-Asocioj.

En 1976 Detlev Blanke doktoriĝis per disertacio pri kompara vortfarado de Esperanto kaj la germana en la Berlina Humboldt-Universitato kaj en la sama universitato habilitiĝis en 1985 per disertacio pri planlingvoj. La libro, kiun li verkis en tiu kadro, *Internationale Plansprachen*, estas ĉefverko en tiu fako ĝis hodiaŭ kaj lia habilitiĝo pri interlingvistiko la internaciskale unua. Tiamaniere li enkondukis la fakon al la scienca pejzaĝo kaj pretiĝis la vojon por sekvaj esploroj.

Precipe emfazindas, ke dum siaj agadoj Detlev Blanke ĉiam klopodis kombini fakan laboron kun la praktiko. Li konsciis, ke serioza scienca laboro pri Esperanto, ĝiaj funkcioj, evoluo kaj kvalito ne eblas sen profundaj scioj pri la komunumo kaj li sukcese ligis siajn esplorojn kun la praktika laboro por la planlingvo. Farante tion, li tamen ĉiam konsideris la kritikan distancon de sciencisto kaj malgraŭ ĉiuj konataj avantaĝoj de Esperanto atentigis pri kampoj, kiuj bezonis profesian pluevoluon, kiel ekz. terminografio.

Detlev Blanke multflanke kaj efike kontribuis al evoluigo de interlingvistiko. Liaj aktivecoj inkluzivas la kreadon de sciencaj strukturoj, kiuj stimulas interlingvistikajn esplorojn kaj plifaciligas la publikigadon kaj disvastigadon de scioj kaj esplorrezultoj. En tiu kunteksto menciendas la fondo de fakgrupo “Interlingvistiko/Esperantologio” en la Esperanto-Asocio de GDR en 1970, el kiu estiĝis la Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik e.V., GIL) en 1991. Kiam li forlasis ĝian estraron okaze de la 20-a jarkunveno en 2011, li povis prezenti imponan bilancon pri du jardekoj da sukcesplena interlingvistika esplorado enkadre de GIL.

Internaciskale elstaras lia laboro en la estraro de Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED), en la redaktaj komitatoj de la revuoj *Language Problems & Language Planning* kaj *Esperantologio / Esperanto Studies*. Krome li havas meritojn kiel bibliografo. Kune kun Humphrey Tonkin inter 1992 kaj 2010 li laboris por la sekcio “Auxiliary languages/international languages” de la

“International Bibliography of Books and Articles on the Modern Languages and Literatures”, kiun eldonas The Modern Language Association of America”. Li estis korespondanto de la Akademio de Esperanto.

Detlev Blanke estis komitanano de Universala Esperanto-Asocio (UEA) de 1978 ĝis 1998, juĝanto pri eseoj por la Belartaj Konkursoj de UEA ekde 1986 kaj aktivis en “Terminologia Esperanto-Centro”. Li organizis naciajn kaj internaciajn sciencajn aranĝojn, i.a. la Rondtablon “Interlingvistiko” dum XIV. Internacia Kongreso de Lingvistoj en 1987 en Berlino kaj la Sekcion “Terminology Science and Planned Languages” dum la internacia konferenco “Professional Communication and Knowledge Transfer” en 1998 en Vieno okaze de la 100-a naskiĝtago de Eugen Wüster. En 1978 li fondis la serion la Esperantologiaj Konferencoj enkadre de la Universalaj Kongresoj de UEA, inter kiuj li mem multajn preparis kaj gvidis. Dum la 101-a UK en Nitra en tiu ĉi jaro renkontiĝis esperantologoj el la tuta mondo jam la 39-an fojon, inter ili ankaŭ Detlev Blanke.

Ĉefa afero por Detlev Blanke ĉiam estis la subtenado de junaj interlingvistoj. Tio montriĝis en lia laboro kiel honora docento pri interlingvistiko en la Berlina Humboldt-Universitato. Li daŭre helpis al junaj sciencistoj same kiel al kolegoj per fakspertaj kaj kritikaj konsiloj, grandanima provizado de fakliteraturo aŭ kuraĝigo.

Detlev Blanke estis honorita diversmaniere pro siaj meritoj. En 2011 li estis elektita Honora Membro de UEA. Okaze de lia 60-a kaj 70-a naskiĝtagdatrevenoj aperis festlibroj, al kiuj kontribuis sciencistoj-kolegoj el la tuta mondo per artikoloj el liaj fakaj terenoj. En Majo de tiu ĉi jaro okaze de lia 75-a naskiĝtagdatreveno GIL organizis honoran kolokvon por li en la Universitato de Leipzig, kiun partoprenis ankaŭ lia familio.

En la pasintaj jaroj fokuso de liaj agadoj fariĝis la daŭrigo de interlingvistika esplorado en la estonteco. Antaŭkondiĉo de tio ja estas, ke la atingajoj de la pasinteco estos konservataj kaj atingeblaj. Kune kun sia edzino Wera, Detlev Blanke preparis la transdonadon de sia eksterordinare ampleksa esplorbiblioteko pri interlingvistiko/esperantologio al la fondaĵo “Stiftung Archiv der Parteien und Massenorganisationen der DDR im Bundesarchiv”. Tie jam troviĝas aliaj materialoj, ekz. pri la Laborista Esperanto-Movado. Sekve tie iam troviĝos la plej granda kolektaĵo de sciencaj verkoj pri interlingvistiko/esperantologio.

En la kondolencan libron sur la retpaĝo de GIL Mark Fettes skribis “Mondo sen Detlev! – tio estas afero neebbla, kontraŭ la natura ordo”. Tiel vere ŝajnas. Detlev Blanke mankas al fakuloj pri interlingvistiko, kolegoj kaj amikoj en la tuta mondo. Ili ĉiuj konservos lin en sia honora memoro. La elstaraj agadoj kaj verkoj por interlingvistiko/esperantologio al ni ĉiuj estu instigo daŭrigi lian laboron en lia senco.

1.2 Publikigaĵoj de Detlev Blanke

Ekzistas tri listoj de elektitaj publikigaĵoj de Detlev Blanke:

Publikigaĵoj 1958–2000:

Fiedler, Sabine / Liu Haitao (Eld., 2001): *Studoj pri interlingvistiko. Studien zur Interlinguistik. Festschrift für Detlev Blanke zum 60. Geburtstag.* Dobřichovice (Prago): Kava-Pech [736 p.], 681–725.

Vd. http://www.lingviko.net/db/Bib_Blanke.htm.

Publikigaĵoj 2001–2005:

Blanke, Detlev (2006): *Interlinguistische Beiträge. Zum Wesen und zur Funktion internationaler Plansprachen.* Eld. de Sabine Fiedler. Frankfurt/M. et al.: Lang [405 p.], 331–338.

Publikigaĵoj 2006–2010:

Cyril Brosch/Sabine Fiedler (Eld., 2011): *Florilegium Interlinguisticum. Festschrift für Detlev Blanke zum 70. Geburtstag*. Frankfurt/M. et al.: Lang [424 p.], 19–28.

*

Okaze de lia 70-a naskiĝtagdatreveno en 2011 aperis kompleta bibliografio de Detlev Blanke, eldonita de Ulrich Becker ĉe “Mondial” en Novjorko. Ĝi estas impona havante 234 paĝojn kaj inkluzivante 1207 titolojn elektitajn. Inter tiuj estas tiom gravaj verkoj kiel la volumo “Sprachenpolitik und Sprachkultur” [lingvopolitiko kaj lingvokulturo] (2007), kun dua eldono en 2009, eldonita de Detlev Blanke kaj Jürgen Scharnhorst kaj festlibro dediĉita al Humphrey Tonkin kun pli ol 900 paĝoj, kiun Detlev Blanke eldonis kune kun Ulrich Lins. Ambaŭ verkoj atingis grandan atenton en lingvopolitikaj kaj interlingvistikaj rondoj.

Publikigaĵoj de Detlev Blanke post 2011:

- (2011): 20 Jahre Gesellschaft für Interlinguistik e.V. Ergebnisse und Probleme, En: Fiedler, Sabine (eld., 2011): *Spracherfindung und ihre Ziele. Beiträge der 20. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 26.–28. November 2010, in Berlin*. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik (Interlinguistische Informationen, Beiheft 18), 115–149.
- (2011): Ĉu instrui nur la lingvon? Kiel trovi, teni kaj aktivigi homojn kun specialaj kapabloj? Kelkaj personaj spertoj. *Internacia Pedagogia Revuo* 41(1), 7–13.
- (2011): Die Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (GIL). Grundanliegen und Praxis. *Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft/Humankybernetik (grkg)* 52(2), 58–66.
- (2011): Festlibroj – nova fakliteratura ĝenro en Esperanto – kun aparta konsidero pri la festlibro por Humphrey Tonkin. En: Nosková, Katarína/Baláž, Peter (eld., 2011): *Modernaj teknologioj por Esperanto. Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST 2010)*, Partizánske: ESPERO [323 p.], 170–183.
- (2011): Interlingvistika agado sur landa nivelo: spertoj de la germana “Societo pri Interlingvistiko”. En: Nosková, Katarína/Baláž, Peter (Eld., 2011): *Modernaj teknologioj por Esperanto. Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST 2010)*, Partizánske: ESPERO [323 p.], 184–197.
- (2011): Ĉu “Nitobe-Raporton” por Eŭropa Unio? Ni havu oficialan EU-dokumenton! *Eŭropa Bulletin* 108 (Septembro 2011), 9–11.
- (2011): Zur Plansprachenfrage im Europäischen Raum. En: Busch-Lauer, Ines-Andrea/Fiedler, Sabine (eld.): *Sprachraum Europa – Alles Englisch oder...?* (Studien zu Fach, Sprache und Kultur, 2), Berlin: Frank&Timme. [18S.], 161–180.
- (2011): Pri Magomet Isajev – Kelkaj personaj rimarkoj. *Rusia Esperanto-Gazeto (REGO)* 5/2011 (66), 4–6.
- (2011): Planlingvistiko: eta sed riĉa revuo pri interlingvistiko. En: Haupenthal, Irmi/Haupenthal Reinhard (Eld.): *Instrui – dokumenti – organizi. Fest-libro por la 80a naskiĝ-tago de Claude Gacond*. Bad Bellingen: Edition Iltis, 29–43.
- (2012, Eld.): *Esperanto kaj aliaj lingvoj – kontrastlingvistikaj kaj socilingvistikaj aspektoj. Aktoj de la 31-a Esperantologia Konferenco en la 93-a Universala Kongreso de Esperanto, Roterdamo 2008*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 125 p. ISBN 978-92-9017-120-1.
- (2012, Eld.): *Pioniroj de la Internacia Lingvo. Aktoj de la 34-a Esperantologia Konferenco en la 96-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago 2011*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 71 p.
- (2012): Vortfarado en la germana kaj Esperanto – kelkaj komparoj. En: Blanke, Detlev (eld.): *Esperanto kaj aliaj lingvoj – kontrastlingvistikaj kaj socilingvistikaj aspektoj. Aktoj de la 31-a Esperantologia Konferenco en la 93-a Universala Kongreso de Esperanto, Roterdamo 2008*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, [122 p.], 65–80.
- (2012): Ĉu vanaj klopodoj? Eŭropa Unio, Esperanto kaj la esperantistoj. Parto I: *La Gazeto* 159, 27-a jaro (2012), 8–15. Parto II: *La Gazeto* 160, 27-a jaro (2012), 8–15.

- (2012, kun Wera Blanke): Christa Wolf (1929–2011) – kelkaj personaj notoj. *Beletra Almanako* 13 (Februaro 2012), 6a jaro, 125–127.
- (2012, kun Wera Blanke): Fachsprachliche Kommunikation in Esperanto. En: Brosch, Cyril/Fiedler, Sabine (eld. 2012): *Fachkommunikation – interlinguistische Aspekte. Beiträge der 21. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 18.–20. November 2011 in Berlin*. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik (Interlinguistische Informationen, Beiheft 19), 9–37.
- (2013): Zur Rolle des Fachbulletins “Informilo por Interlingvistoj” (IpI). Pri la rolo de la faka bulleto “Informilo por Interlingvistoj” (IpI). En: Věra Barandovská-Frank (Eld.): *Littera scripta manet. Serta in honorem Helmar Frank*. Paderborn: Akademia Libroservo/Dobřichovice (Prago): KAVA-PECH [728 p.], 144–151.
- Wera Blanke (2013): *Priterminologia laboro en Esperanto. Elektitaj publikaĵoj*. (Redaktis Detlev Blanke), New York: Mondial, 318 p.
- (2013): *Pri terminologia laboro en Esperanto. Elektitaj publikaĵoj*. Enkonduko al Wera Blanke (2013). New York: Mondial, I–VII
- (2013): Kion fari pri Esperantaj bibliotekoj kaj arkivoj? I-a parto. *La Gazeto* 165, 28-a jaro (2013), 15–19; II-a parto *La Gazeto* 166, 28-a jaro (2013), 8–13.
- (2014): Kio estas GIL? *La Ondo de Esperanto*, 4–5/2014, 13.
- (2014): Esperanto en GDR kaj aparte en Turingio 1945–1990. En: *Deutscher Esperanto-Bund. 91-a Germana Esperanto-Kongreso. Erfurt, 6.-9.6.2014*. (Kongreslibro), 36–53. kun bibliografioj de Alfred Kirchhoff [1838–1907], Ernst Beermann [1853–1936], Hans-Joachim Plehn [1905–1985], Karl-Hermann Simon [1930–2011])
- (2014): *Interlingvistiko – ĉu nur intelekta ludaĵo?* Prelego dum la 40. Malferma Tago in Rotterdam am 10.5.2014. www.esperanto-tv.com/955
- (2014): Zeitschrifteninhalte erschließen: Vorbildlich für “Esperantisto Slovaka”. *Esperanto aktuell* 33(2), 12.
- (2014): Kiel mezuri la gravecon de lingvo? *Internacia Pedagogia Revuo* 44(3), 27–29.
- (2014): Die Bibel in Plansprachen. En: Müller, Ina (eld. 2014): *Translationswissenschaft als Interdisziplin: Beiträge des Ehrenkolloquiums zum 70. Geburtstag von Heidemarie Salevsky*. Berlin: epubli, 95–122.
- (2014): Kompetent urteilen? Wege zur Fachinformation über Plansprachen. En: Brosch, Cyril/Fiedler, Sabine (eld., 2014): *Interlinguistik im 21. Jahrhundert. Beiträge der 23. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 29. November–01. Dezember 2013 in Berlin*. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (Interlinguistische Informationen, Beiheft 21), 9–28.
- (2014): André Martinet. *La Ondo de Esperanto*, 22/2014, 19.
- (2015): How not to reinvent the wheel... The essential scholarly literature in interlinguistics and esperantology. *Interdisciplinary Description of Complex Systems. (INDECS) 13/2* (special issue: The phenomenon of Esperanto), 200–215. PDF: http://indec.s.eu/index.php?s=13_2&y=2015.
- (2015) (kun Wera Blanke): Is scholarly communication possible in a so-called “artificial” language? *Interdisciplinary Description of Complex Systems. (INDECS) 13/2* (special issue: The phenomenon of Esperanto), 216–235. PDF: http://indec.s.eu/index.php?s=13_2&y=2015.
- (2015): Eugen Wüster – la planlingvoj kaj la Enciklopedia Vortaro. Berlin: bindita manuskripto, 104 p.
- Wüster, Eugen (2015): Enciklopedia Vortaro Esperanta – Germana. Transskribita de Hans-Joachim Plehn. Kvina liverparto. Korno – luzulo. Berlin: bindita manuskripto, 114 p.
- (2015): En Germanio: Esperanto-bibliotekoj kaj arkivoj sub ŝtata protekto. En: Novotničková, Katarína (eld.): *Arkivoj kaj bibliotekoj – kiel protekti kaj konservi nian heredaĵon*. Partizánske: ESPERO, 21–32.
- (2015): Kiel kaj kie informiĝi pri faka literaturo? Pri kelkaj lastatempaj esperantologiaj publikaĵoj. En: Kiselman, Christer/Vergara José Antonio (eld.): *De esperanta korpuso ĝis islanda lingvopolitiko. Aktoj de la 36-a Esperantologia Konferenco en la 98-a Universala Kongreso de Esperanto, Rejkjaviko 2013*. Rotterdam: UEA, 53–66.

- (2015): Jefim Etkind: “Sed ja Esperanto ne havas literaturon...” *Rusia Esperanto-Gazeto (REGO)* 1/2015 (86), 21–22.
- (2015): Krimoj de la eklezio. *Ateismo. Bulteno de Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo* 20 (Majo 2015), 10–12. (pri Karlheinz Deschner)
- (2015) (de kaj kun Sebastian Kirf): *Pri planlingvoj, interlingvistiko. Esperanto, lingvopolitiko kaj kelkaj aliaj temoj. Video-Intervjuo kun Detlev Blanke*. Realigita kaj vidbende registrita de Sebastian Kirf. Tradukita el la germana al Esperanto de Vilhelmo Lutermano. Embres-et-Castelmaure: Monda Asembleo Socio.
- (2015): Stenografie und Plansprachen. En: Brosch, Cyril/Fiedler, Sabine (eld.): *Die Plansprachenbewegung rund um den Ersten Weltkrieg. Beiträge der 24. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 21.–23. November 2014*. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (Interlinguistische Informationen, Beiheft 22), 51–95. (kun ilustraĵoj)
- (2015): Esperanto kaj Ateismo. *Ateismo. Bulteno de Ateista Tutmonda Esperanto-Organizo* 21 (Novembro 2015), 6–15.
- (2015): Réponses au questionnaire de l'enquête. En: Eva Zaki (2015): *Quelle image pour l'espéranto? Regard sur l'image à travers les principales position idéologiques du mouvement en Europe* (magistra laboraĵo, Université de Genève, Faculté de traduction et d'interprétation, 156 p.) respondoj (en la angla): p. 127–128, 130, 133, 135–136, 138, 140, 142, 144, 146, 147–148, 150, 151–152, 153, 155. <https://archive-ouverte.unige.ch/unige:75452>
- (2015): Das Sprachenproblem der Europäischen Union – zwischen Mehrsprachigkeit und Dominanz des Englischen. *Ido-Saluto!* (Berlino) 1/2016, 12–14.
- (2015) La linguala problemo dil European Unio. *Progreso*, 364 (Januar-April 2016), 18–30.

Recenzoj

- Frapaj analizoj pri imperiaj ambicioj. *Esperanto* (Rotterdam) 107/4, 90. (Recenzo pri: Noam Chomsky, *Imperiaj ambicioj. Interparoloj pri la mondo post la 11-a de septembro. Intervjuoj kun David Barsamian*. Trad. div., Rotterdam: Bero, 2013, 160 p. – Esperanta traduko de Noam Chomsky [2005] *Imperial Ambitions. Conversations on the Post 9/11 World*, New York: Metropolitan Books)
- Kompakta skizo zu la mondo de lingvoj kaj ĝia estonteco. *Esperanto* (Rotterdam) 108(6), 138. (Recenzo pri Max Hans-Jürgen Mattusch (2012): *Unsere Sprachenwelt und ihre Zukunft*. Norderstedt: BoD, 268 p.)
- Unter Freunden im Kibbuz. Esperanto in einem neuen Buch von Amos Oz. *Esperanto aktuell* 3/2014, 11. (Recenzo pri la rakonto “Esperanto” en Amos Oz (2012): *Unter Freunden*, Berlin: Suhrkamp [215 p.], 185–216)
- Iom pri literaturhistoriaj enciklopedioj de esperanto. *La Ondo de Esperanto* 1/2016, 20. (Recenzo pri Minnaja, Carlo/Silfer, Giorgio (2015): *Historio de la esperanta literaturo*. La Chaux-de-Fonds: LF-Koop, 748 p.)
- Kio estas la literaturo de Esperanto? *Beletra Almanako* 25 (Februar 2016), 10-a jaro, 152–153. (Recenzo pri Minnaja, Carlo/Silfer, Giorgio (2015): *Historio de la esperanta literaturo*. La Chaux-de-Fonds: LF-Koop, 748 p.)

*

Aliaj verkoj de Detlev Blanke estas en la fazoj de preprado aŭ presado. Inter ili kolektaĵo de artikoloj en la angla lingvo, kiu aperos ĉe la eldonejo “Mondial” en Novjorko.

2 Interlingvistiko kaj Esperanto en Universitatoj

2.1 Buchanan-prelego

Oni daŭrigis la tradicion de prelegoj honore al John Buchanan en la Universitato de Liverpool (vd. *IPI* n-ro 98 p. 8/9). La 20-an de oktobro 2016 prelegis Sabine Fiedler pri la temo “Phraseology as a

Mirror of Culture – A Survey with Examples in Esperanto, English and German”. Al la prelego sekvis epilogo de Wim Jansen: “Esperanto, a gateway to lesser known cultures. Uncovering the phraseological wealth of Basque”.

2.2 Esperanto-kursoj kaj kursoj pri interlingvistiko en universitatoj

En germanaj universitatoj kaj altlernejoj okazas dum tiu ĉi vintra semestro la sekvaj kursoj:

- (1) Esperanto-kurso por komencantoj kaj progresintoj en Hochschule Emden/Leer gvidata de Sebastian Kirf
- (2) Seminario pri ”Planlingvoj kaj Pasigrafioj” en la Universitato de Rostock, Sekcio pri Slavistiko, gvidata de Cornelia Mannewitz
- (3) Modulo ”International Linguistic Communication – Political and Societal Challenges” okazas en la Universitato de Leipzig. Ĝi konsistas el prelego pri planlingvoj (en la germana lingvo, gvidata de Sabine Fiedler), seminario ”English in a Global Context” (en la angla, gvidata de Sabine Fiedler) kaj Esperanto-kurso (gvidata de Cyril Brosch). La modulo baziĝas sur la spertoj pri simila modulo en 2007/08, subtenita de Esperantic Studies Foundation (raportoj aperis en *Language Problems & Language Planning* 32:3 (2008) pp. 269-279 kaj *IPI* 65).

La Universitato Adam Mickiewicz en Poznano (Polujo) daŭrigas la tradicion de Postdiplomaj Interlingvistika Studoj sub la gvido de Ilona Koutny. En la ĉi-jaraj sesioj (de la 30-a de Januaro ĝis la 5-a de Februaro 2016 kaj la 17-a ĝis la 23-a de Septembro 2016) partoprenis 17 studentoj (5 el Brazilo, po 3 el Hispanio kaj Pollando, po 1 el Svedio, Serbio, Ĉeĥio, Rusio, Kroatio kaj Belgio). Tiuj ”tradiciaj” Postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj komenciĝos por nova grupo en la studjaro 2017/18, pliajn informojn pri la enhavo kaj aliĝo troveblas ĉe <http://www.amu.edu.pl/~interl/>. Krome en Poznano aperos nova eblo por magistras studoj kun forta interlingvistika elemento, vd. la sekvan subĉapitron.

2.3 Novaj magistras studoj interlingvistikaj ĉe UAM en Poznano

En la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano (UAM) estas nova eblo de magistras studoj pri etnolingvistiko kun interlingvistika modulo.

La du-jaraj surlokaj studoj (en la Lingvistika Instituto, Fakultato de Moderna Filologio) estas ofertataj la unuan fojon por studentoj el diversaj landoj. Ili entenas studobjektojn pri:

- lingvistiko, kulturo, antropologio,
- internacia kaj interkultura komunikado,
- planlingvoj kaj esperantologio,
- daŭrigo de la lingvoj angla kaj esperanto, komenco de la pola.

La studoj okazos en Esperanto kaj la angla, finiĝos per diplomalaboraĵo kaj fina ekzameno. Ili validas sume 120 ECTS-poentojn.

Postuloj por aliĝi al la studoj estas baza (bakalaŭrea) universitata diplomo kaj almenaŭ meza scio de Esperanto kaj la angla (nivelo B1). La studkotizo por landoj ekster Eŭropa Unio estas po 2500€ en studjaro (EU-anoj povas studi senkotize).

Poznano estas bone alirebla per trajno (meze inter Berlino kaj Varsovio) kaj aviadile, la loĝ- kaj manĝokostoj estas moderaj.

Kandidatoj por 2017–2019 estas bonvenaj jam nun anonci sian deziron ĉe la koordinanto Ilona Koutny (ikoutny@amu.edu.pl), la fina limdato por aliĝo estas 2017-08-15. La studoj komenciĝos fine de Septembro 2017.

(laŭ informo de Ilona Koutny)

3 Internaciaj aranĝoj

3.1 101-a UK en Nitro: *Lingvopolitika Simpozio*

(La raportoj el *La Ondo de Esperanto*, <http://sezonoj.ru/2016/08/slovakio-12/> und <http://sezonoj.ru/2016/08/andriukaitis/>)

Samtempe kun la 101-a UK en Slovakujo la 28-an kaj 29-an de Julio 2016 en la universitato de Nitra sub la alta protekto de la slovak ministerio pri eksterlandaj kaj eŭropuniaj aferoj okazis lingvopolitika simpozio titolita “Perspektivoj de lingva komunikado en la Eŭropa Unio”. La oficialaj laborlingvoj de tiu aranĝo, en kiu partoprenis multaj sciencistoj kaj politikistoj, estis la angla, Esperanto kaj la slovak (kun interpretado).

Precipe konsiderinda estis la inaŭgura parolado la litova EU-komisiano Vytenis Povilas Andriukaitis, kiu ne nur parolis pozitive pri, sed ankaŭ en Esperanto. Krome efektiviĝis la sekvaj prelegoj (ni citas nur la anglajn titolojn sendepende de la uzata lingvo):

Eva Poláková Activities of the Slovak civic platform in international communication

Ildikó Vančo European language regime: nations, minorities, languages

Seán Ó Riain The propedeutic approach to improved language learning

Okazis kelkaj podiaj diskutoj laŭ la temo “Language problems of civic participation and economic integration into the EU”:

1. “Multilingualism, Linguistic Democracy and Social Justice” (kiel podia diskuto kun Davide Astori, Pierre Dieumegard, Federico Gobbo, Pádraig Ó Laighin, Eugen Macko, Jacek Protasiewicz, Giorgio Silfer, Jiří Zlatuška, kiel ronda tablo kun Javier Alcalde, Anikó Beregszászi, Michael Farris, Mireille Grosjean, Ákos Horony, Ivana Kapráliková, Laure Patas-d-Illiers, Csaba Pákozdi, János Pusztay, Bengt-Arne Wickström)
2. “State and perspectives of foreign language learning in the EU” (kiel podia diskuto kun Lucie Betáková, István Csernicskó, Ina Druviete, Beáta Fábrián, Mireille Grosjean, Réka Máté, Gizella Szabó Mihály, Zlatko Tišljar, kiel ronda tablo kun Ilona Koutny, Maria Majerczak, Maria Kocór, Zsófia Kóródy, Miroslav Malovec, György Nanovfszky)
3. “Models of multilingual communication management” (Eva Čulenová, Filip Krepelka, Marcelle Provost, Vojtěch Merunka, Viktor Dvořák, Ladislav György, Mart Rannut)

3.2 101-a UK en Nitro: *Esperantologia Konferenco*

Dum la 101-a UK en Nitro okazis ankaŭ la 39-a Esperantologia Konferenco, organizite de Maria Rosaria Spanò kaj Orlando E. Raola. Ĝia ĉeftemo estis “Evoluo kaj evoluigo de la internacia lingvo Esperanto: diversspecaj influoj kaj faktoroj”. Efektiviĝis la jenaj prelegoj:

François Lo Jacomo: *Ĉu necesas evoluigi Esperanton?*

Antaŭ pli ol kvardek jaroj, mia profesoro pri lingvistiko André Martinet instruis al mi, ke «lingvo evoluas ĉar ĝi funkcias». Do, por konvinki lingviston, ke Esperanto estas vivanta lingvo, necesas pruvi, ke Esperanto kapablas evolui «same» kiel naciaj lingvoj. Sed la evoluo de lingvo povas deveni de multaj kaŭzoj. Ĝi povas veni de evoluo de la socio. En la franca lingvo ekestis antaŭ kelkaj jardekoj la bezono de nova vorto por tiu, kiu lernas ekster la «normala

lerneja» medio, ĉar pli kaj pli diversiĝis la maniero lerni. Tial enkondukiĝis la vorto «apprenant». En Esperanto, ne estas simila bezono: ekde la komenco, Esperanto-lernantoj lernas ekster la lerneja medio, kaj se ja necesas specife mencii tiun, kiu lernas en lernejo, ni simple uzu lerneĵano. En nacia lingvo, evoluo povas rezulti iankaŭ de politika decido. Ekzemple, antaŭ kvar jaroj la franca ĉefministro decidis malpermesi la uzon de la vorto «fraŭlino» en administracio, kaj tio jam estas aplikata en lernejoj, trajnoj... supozeble tio kreos lingvan evoluon: ĉuekzistas tiom aŭtoritataj decidoj en Esperantujo? Analizante la diversajn kaŭzojn de evoluo de etnaj lingvoj kaj de Esperanto, oni evidente konstataj diferencojn. Tamen la ideo, ke kiel planlingvo, Esperanto ankoraŭ devas esti evoluigita per aŭtoritataj decidoj kaj ne estas sufiĉe matura por evolui mem estas refutebla.

Federico Gobbo: *'Lingvo Internacia' aŭ 'internacia lingvo'?: Kelkaj konsideroj pri la origina nomo de Esperanto en diakrona perspektivo*

En la unuaj priskriboj de la gramatiko de Esperanto kaj en siaj Lingvaj Respondoj, Zamenhof donis multan atenton al morfologio, t.e. la vortformado, kaj kompare malmultan atenton al sintakso, t.e. la vortordo. Jansen (2008, 2007) konvinke argumentas, ke la baza vortordo de la lingvo estas subjekto-verbo-objekto (SVO); aliflanke, en la kazo de la vortordo de nomoj (N) kaj adjektivoj (A), ambaŭ ordoj AN kaj NA eblas, eĉ se AN nepre pli oftas (kiel ankaŭ Gledhill 2000). Laŭ la Oftecvortaro de Esperanto (Quastoff, Fiedler kaj Hallsteinsdóttir 2014) la vortoj 'internacia' kaj 'lingvo' troviĝas en la plej alta oftocoklaso de la tuta oftecvortaro, kaj tiel alta vortofteco estas pruvo pri ilia graveco en la kulturo de la lingvo (Fiedler 2010, 2016). La esprimo 'Lingvo Internacia' estas listigita kiel grava esperantonimo en Melnikov (2015:191) kiel "origina nomo" de Esperanto. La prelego intencas prezenti kelkajn konsiderojn pri la pranomo en diakrona (t.e. tratempa) perspektivo, komparante la uzon de la esprimoj 'Lingvo Internacia' kaj 'internacia lingvo' per korpusoj en Zamenhof kaj aliaj aŭtoroj, kiuj verkis en la lingvo en diversaj momentoj de la historio de la lingvo mem.

Christer Kiselman: *La jidogramatiko de Zamenhof kaj lia Lingvo universala*

Zamenhof verkis gramatikon pri jido ĉirkaŭ 1880. Mallonga raporto pri ĝi estis publikigita en la revuo *Leben un vissenŝaft* en 1909, sed plene ĝi aperis nur en 1982.

La gramatiko estas verkita en la rusa lingvo kaj science priskribas jidon, sed la aŭtoro strebis ankaŭ al unuecigo de la lingvo, kiu estis parolata en multaj dialektoj. Temis pri elekto inter pluraj prononcoj kaj pri decidoj pri gramatikaj trajtoj. Tial la verko enhavas normigajn elementojn. Zamenhof studis medicinon en la Imperiestra Moskva Universitato dum du jaroj, de aŭgusto 1879 ĝis aŭgusto 1881, kio signifas ke, kredeble, la ellaborado almenaŭ parte okazis en Moskvo. Li proksimume samtempe ellaboris lingvon nomatan *Lingvo universala*, kiu estas pluevoluigaĵo de lia *Lingwe uniwersala* (Bjalistoko 1878) kaj antaŭiranto de *Lingvo internacia* publikigita en Varsovio en 1887. Mi montros ke ekzistas similecoj inter la du lingvoj jido kaj *Lingvo universala*.

Maria Rosaria Spanò: *Juda fantomo en ĉinaj skatoloj: la rolo de la judeco de Zamenhof en la historio de Esperanto.*

En tre konata letero al Alfred Michaux (14.III.1905), L.L. Zamenhof skribas, rakontante pri sia vivo: Se mi ne estus hebreo el la ghetto, la ideo pri la unuigo de la homaro aŭ tute ne venus al mi en la kapon, aŭ ĝi neniam tenus min tiel obstine en la daŭro de mia tuta vivo. La malfeliĉon de la homara disiĝo neniu povas senti tiel forte, kiel hebreo el la ghetto.

Plene sentema pri la kondiĉo de sia popolo, antaŭtempa pasia cionisto, Zamenhof transiris el fokuso je la hebrea popolo al plej ampleksa vido kaj idearo koncernanta la tutan homaron, kaj laŭ la lingva kaj laŭ la ideala perspektivo. En la Unua Libro (1887), Zamenhof mem komparis la transiron de cionismo al Esperanto al la transiro de la rivero Rubikono en 49 a.K. fare de Julio Cezaro, do al findecida, neforviŝebla ago.

La judeco de Zamenhof daŭre ludis gravan rolon dum la tuta intelekta kaj ideala itinero de Zamenhof. La tuta vojo – inter kies mejloŝtonoj ĝis la formulado de la interna ideo menciindas

Hilelismo kaj Homaranismo – estis konstante katakterizita, laŭ la jam menciita letero al Michaux, de konstantaj bataladoj internaj kaj eksteraj – ĉiuj [...] nedisigeble ligitaj cetere kun la juda identeco de Zamenhof.

D-ino Esther Schor, docento ĉe la Universitato de Princeton, en sia eseo Esperanto: a Jewish History, difinis la historion de Esperanto ”serio da ĉinaj skatoloj enhavantaj judan fantomon”. Tiu ĉi kontribuo strebos ”malfermi la skatolojn” kaj retrorigardi la historion de Esperanto laŭ tiu ĉi perspektivo.

Ariadna García Gutiérrez: *Ontologio: Ĝia rolo en la scienca Esperanto-evoluo*

Organizi kaj reprezenti informojn konsistigas unu el la grandaj defioj nuntempaj, kie je pli vastaj niveloj produktatas informoj en la ĉiutaga vivo, des pli kun la alveno de la novaj teknologioj pri informado kaj komunikado. Kiel rolas ontologioj en tiu organizado kaj reprezentado de informoj por evoluigi Esperanton?

La scienca agado en Esperantujo, miaopinie, estas unu el la plej malfacilaj agadkampoj, ne pro la fakto ”sciencumi”, sed pro la atingeblecoj oferataj de Esperanto ekde scienca vidpunkto al la socio, pli ekzakte dirite: al la ne esperantistoj.

Gravas verki, traduki al Esperanto por esperantistoj, sed ankaŭ verki pri Esperanto kaj montri al la socio kion la komunumo faras, kiujn valorojn oni povas atingi pere de tiu agado kaj kiom riĉa povas esti la lingvo socie, ekonomie, lingvistike, kulture kaj praktike.

Surbaze de la diplomalaborajo titolita ”Dizajno pri baza ontologio de la Nacia Kongreso de Esperanto” oni celis ne nur prezenti la lingvon al la ne esperantista scienca komunumo, sed atingi bibliografian verkon kaj praktikan aplikadon pere de ontologioj: sistemoj por organizi kaj reprezenti informojn pri specifa fakkampo tra terminologiaj kaj konceptaj specifaĵoj en formala lingvo (maŝin-komprenata), kun la celo plifaciligi la serĉon kaj reakiron de informoj per semantikaj interkompreniĝoj inter uzantoj kaj inteligentaj programaroj.

Samkiel la ontologioj, ekzistas pluraj sistemoj por organizi kaj reprezenti informojn ne nur laŭ tradicia maniero sed ankaŭ reta. Tial prezenti ilin evidentigas sciencan evoluon por la movado kaj la lingvo nepreteratentenda, ĉar ĝi kontribuas al la lingva evoluigo.

3.4 101-a UK en Nitra: Internacia Kongresa Universitato

Gvidate de Eva Poláková dum la 101a UK en Nitra okazis ankaŭ la 69-a Internacia Kongresa Universitato, kun la sekvaj prelegoj (kiuj parte samtempe estis lecionoj de AIS San Marino):

Javier Alcalde: *Lingva justeco en la fakliteraturo*

Mark Fettes: *Edukado al repaciĝo: Kanadaj lernejoj alfronte al la indiĝena realo*

Michael Maitzen: *Ĉu ZAMENHOF kaj ESPERANTO povas endanĝerigi nian Teron? La rilato de asteroidoj en nia sunsistemo al nia planedo*

Orlando E. Raola: *Novaj teknikaj evoluoj por bildigi procezojn je atoma kaj subatoma niveloj*

So Gilsu: *La Diabloj en Silka Vojo - ĉu rabistoj aŭ savintoj*

Anna Striganova: *Samaj motivoj en popolaj fabeloj de diversaj landoj*

José Antonio Vergara: *Socia justeco kaj publika sano kiel principoj fronte al la neatendita kontraŭstara sinteno al vakcinoj*

Amri Wandel: *Astrobiologio kaj vivo en nia kaj aliaj sunsistemoj*

Bengt-Arne Wickström: *Lingva justeco: Optimumaj minoritataj rajtoj kaj ilia realigo*

Krome okazis denove la t.n. Scienca Kafejo por kiu oni anoncis la sekvajn prelegetojn:

Davide Astori: *Pri lingva ekologio*

Ivan Eidt Colling: *Stel-domo en Kuritibo, Brazilo: materiigo de lingva kaj filozofia idealoj*

François Lo Jacomo: *La Internaciaj Olimpiadoj pri Matematiko*

Dmitrij Ŝevĉenko: *Esperanto en la socireta epoko, kiel rimedo de la lingva justeco*

Bernhard Tuider: *La Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko*

La aktoj de IKU kiel kutime aperis jam dum la kongreso:

Vergara, José Antonio/André, Alexandre (eld., 2016): *Internacia Kongresa Universitato. 69-a sesio*. Rotterdam: UEA.

4 Publikigaĵoj

4.1 Aktoj de la 25-a jarkunveno de GIL (Beiheft 23)

Aperis volumo 23 de la aktoj de la konferencoj de la Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik e.V., GIL) kun la prelegoj de la 25-a jarkunveno, kiu okazis de la 13-a ĝis la 15-a de Novembro 2015 en Berlino. La volumo enhavas la sekvajn artikolojn:

Cyril Brosch: *Esperanto im Munde von Nicht-Esperantisten* [Esperanto en la buŝo de ne-esperantistoj] (p. 9–48):

Dum jam estis studoj pri la uzado de la lingvonomo “Esperanto” fare de ne-esperantistoj, la uzado de lingvo-elementoj de Esperanto ekster la lingvokomunumo ĝis nun ne estis traktita en sistemeca studo. Ĉi tiu artikolo kolektas, ordigas kaj interpretas okdek ok ekzemplojn por tiaj uzoj. Evidentiĝas, ke la ĉefa motivo por la ne-parolantoj uzi Esperanton estas la atribulado de formaj, praktikaj aŭ idealismaj trajtoj al la lingvo. Dum unuflanke la plioftiĝanta uzo por ne-esperantista publiko atestas certan altiĝon de la prestiĝo de la lingvo, aliflanke montras la rimarkindaj eraroj en la realigo de la Esperantaĵoj, kaŭzita de nescio, ke Esperanto ankoraŭ ne estas traktata same serioze kiel aliaj lingvoj.

Sabine Fiedler: (...) a slim core of Esperanto roots (...) and a huge periphery of (English) borrowings? – *Kommt es zu einer Anglisierung des Esperanto?* [(...) a slim core of Esperanto roots (...) and a huge periphery of (English) borrowings? – Ĉu Esperanto fariĝas pli kaj pli angla?] (p. 49–68):

La angla fariĝis la ĉefa ilo de internacia komunikado. Pro sia rolo kiel lingvafrankao ĝi havas gravajn influojn al aliaj lingvoj en la tuta mondo, kiuj koncernas ĉiujn terenojn de la lingvosistemo – antaŭ ĉio la ebenon de leksiko, sed ankaŭ la morfologion, sintakson, frazeologion, la ebenon de teksto kaj genroj kaj la komunikadan konduton de parolantoj. La artikolo okupiĝas pri la influo de la angla al Esperanto fokusante tri terenojn, en kiuj evidentiĝas la inklino de parolantoj enkorpiigi materialon el aliaj lingvoj: lingvoŝalto (aŭ kodalterno), la kreado de novaj vortoj kaj tradukado. Montriĝas, ke la influo de la angla ne evitas la planlingvon, sed ke la influoj al Esperanto atingas klare pli malaltan nivelon ol en aliaj lingvoj. Estas kaj lingvaj propraj kaj karakterizaĵoj de la komunumo, kiuj kontraŭagas, antaŭ ĉio la identeco kaj lingva lojaleco de la parolantoj. Rilate al la eltrovita korelacio inter la sinteno kaj la lingvokonduto de la parolantoj estas paraleloj inter Esperanto kaj endanĝerigitaj lingvoj.

Rudolf-Josef Fischer: *Konkurrierende Anforderungen an ein Esperanto-Lehrwerk für Deutschsprachige* [Konkurantaj postuloj al Esperanto-lernolibro por parolantoj de la germana] (p. 69–90):

Didaktike konforma strukturo de lernolibro por instrui fremdan lingvon dependas de multaj parametroj. Per la ekzemplo de la instruilo "Esperanto en dialogo" estas montrataj diversaj problemoj, kiujn la aŭtoro devis solvi. Dum ekzemple la avantaĝoj de elektronika versio ŝajnas nerezigneblaj, aliaj lernantoj insistas pri la formo de libro. Plie la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) ebligas normon kaj kompareblon de la instru- kaj lern-celoj, sed nur malklare priskribas la atingendan nivelon. Krome KER antaŭvidas komunikajn situaciojn, kiuj tute ne konformas al la ĉiutago en Esperantujo. Fine, por laŭeble rapide povi esprimi la plej ĝeneralajn aferojn, oni devas lerni unue la plej oftajn vortojn, sed ĝuste tiuj normal-okaze estas tro banalaj por trovi la intereson de la lernanto. "Esperanto en dialogo" sekve ekzistas en ambaŭ formoj, kaj kiel libro, kaj kiel elektronika super-

teksto. Sed la libro havas nur kvin el la dek lecionoj kun nur skizo de gramatiko, kun simpla dulingva vortlisto, ktp., tiel ke nepras la kompromiso, krome uzi ordinarajn vortarojn kaj precipe la elektronikan version de "Esperanto en dialogo". La instruataj ĉ. 2000 vortformoj fontas el listo de Löwenstein (2001) kun 1000 plej oftaj morfemoj. La unuaj kvin lecionoj enhavas ĉ. 1100 vortformojn kaj la tutan "kerngramatikon" de Esperanto kaj do devus sufiĉi por la nivelo A2 de KER. La ceteraj kvin lecionoj traktas i.a. la 15 specialajn temojn, kiujn la faka literaturo rekomendas por la Esperanto-instruado.

Anna-Maria Meyer: *Slavische Plansprachen im Zeitalter des Internets* [Slavaj planlingvoj en la reta epoko] (p. 91–113):

Slavaj planlingvoj (ankaŭ nomitaj konstruitaj aŭ artefaritaj lingvoj) estis ĝis nun vaste malatentitaj de interlingvistiko kaj de slavistiko, sed la nombro de projektoj pri komuna slava lingvo kreskis ekde la 17-a jarcento, komenciĝante per *Ruski jezik* (1666) de Juraj Križanić kaj daŭrante ĝis *Slovan* (1940) de Arnošt Eman Židek kaj plue. La konstruado de slavaj lingvoj lastatempe spertis reviviĝon pro la disvastiĝo de Interreto ekde la 1990-aj jaroj. Tio ĉefe manifestiĝis en tri amplekse ellaboritaj projektoj kun propraj retpaĝoj kaj komunumoj de uzantoj: *Slovio* (1999), *Slovianski* (2006) and *Novoslovianski* (2010). Tiuj tri projektoj – unu el ili skemisma, du naturalismaj – estas prezentataj en la historia kunteksto de la Slava lingvokonstruado de la 17-a jarcento ĝis la nuntempo kaj analizataj laŭstrukture rilate al siaj skribsistemoj, gramatikoj kaj la konsisto de siaj leksikoj. Kvankam iliaj ŝancoj pri praktika enkonduko en kunteksto de Eŭropa lingvopolitiko nuntempe estas relative marĝenaj, oni aprezu ilin kiel unikajn fenomenojn en la slava kultura historio.

Krunoslav Puškar: *Deutsche lexikalische Vorbilder im Esperanto* [Germanaj leksikaj modeloj en Esperanto] (p. 115–127):

Tiu ĉi artikolo provas montri la pozicion de la germana lingvo en Eŭropo hodiaŭ kaj pli ol cent jarojn antaŭe, kiam Esperanto estis eldonita kiel projekto, emfazante la ŝanĝon en lingva influo dum la jaroj. La eksa pli granda influo de la germana lingvo estas montrata helpe de la ekzemplo de la planlingvo Esperanto kaj 298 germanaj pruntvortoj, kiuj eniris la *Fundamenton* de Zamenhof kaj tiamaniere Esperanton. Tamen, la analizo montras, ke inter tiuj 298 germanaj pruntvortoj nur 182 pruntvortoj povas esti konsiderataj veraj germanaj pruntvortoj: 99 pruntvortoj estas konsiderataj komunaj germanlingvaj-jidaj pruntvortoj kaj 17 pruntvortoj duone germanaj pruntvortoj. Ĉiuj pruntvortoj estis analizitaj laŭ naŭ tipoj de la ĝenerala adapto de fremdaj morfemoj al Esperanto (bazita sur Szerdahelyi 1976), sed ankaŭ laŭ apartaj lingvaj niveloj: ortografia, fonologia kaj morfologia, akcentante la diferencojn, sed ankaŭ similecojn inter la du lingvoj, la germana kaj Esperanta. Laŭ ĉi tiuj niveloj, la plej komunaj principoj de pruntvortaj adaptoj estas atentigitaj: pli facila elparolo kaj la homonimia evito.

Heidelamrie Salevsky: *Gerechtigkeit – ein Schlüsselproblem* [Egaleco – ŝlosila problemo] (p. 129–134; kontribuo honore al Detlev Blanke):

Justeco estas centra ideo kaj en la Biblio kaj en prisociaj teorioj. Ĝi estis temo en diskutoj ankaŭ inter interlingvistoj kaj traduksciencistoj, ekz. kiam ili komparis la tradukojn de la Malnova Testamento fare de Lutero kaj Zamenhof. Bona okazo aperas en la Libro de Amos, verso 4,1, kie la traduko de Zamenhof estas eĉ pli energia ol tiu de Lutero. Komunajo inter la Biblio kaj la teorioj de Markso konsistas en la alvoko al ŝanĝo de la mondo. Laŭ Zamenhof la pledo por justeco estas la nedisputebla renkontiĝejo por la malsamaj religioj, kulturoj kaj ideologioj.

4.2 Gazzola kaj Wickström pri ekonomiko de lingvarpolitiko

Laste aperis

Gazzola, Michele & Wickström, Bengt-Arne (2016): *The Economics of Language Policy*. Cambridge: MIT Press.

Enkonduke

Tiu ĉi interdiscipline orientita libro enhavas kontribuaĵojn prezentitajn dum laborsesio ĉe la Venecia Internacia Universitato en Julio 2013. Inter la temoj traktitaj estas la influo de lingvodiverseco al ekonomiaj rezultoj, la distribuaj efikoj de lingvopolitiko, la sekvoj de socia dulingveco al la bonfarto de unuopuloj, la efiko de lingvouzo kaj lingvokonaj por laborenspezoj kaj la sekvoj, kiujn komuna lingvo povas havi por komercaj rilatoj kaj la decidoj de loĝantaro esti movebla. La libro inkluzivas ampleksan superrigardon pri la esplortero de lingvoekonomiko kaj multlingvan bibliografion kun 500 titoloj.

Enhavtabelo

Michele Gazzola and Bengt-Arne Wickström: *Introduction*

I A Map and a Compass of Language Economics

1 François Grin: *Fifty Years of Economics in Language Policy: Critical Assessment and Priorities*

2 Michele Gazzola, François Grin, and Bengt-Arne Wickström: *A Concise Bibliography of Language Economics*

II Linguistic Diversity, Welfare, and Language Policies

3 Victor Ginsburgh and Shlomo Weber: *Linguistic Diversity, Standardization, and Disenfranchisement: Measurement and Consequences*

4 Maxime Leblanc Desgagné and François Vaillancourt: *Distribution of the Benefits and Costs of Canada's Federal Official Languages Policy: Results for 2001*

5 Ramon Caminal: *Economic Value of Reciprocal Bilingualism*

6 José Ramón Uriarte and Stefan Sperlich: *Economic Theory and Minority Language*

7 Katalin Buzási: *Languages and National Identity in Sub-Saharan Africa: A Multilevel Approach*

III Language as Human Capital

8 Gilles Grenier and Serge Nadeau: *English as the Lingua franca and the Economic Value of Other Languages: The Case of the Language of Work in the Montreal Labor Market*

9 Alisher Aldashev and Alexander M. Danzer: *Bilingualism and Economic Performance*

IV Trade and Mobility

10 Ainhoa Aparicio-Fenoll and Zoë Kuehn: *Does Foreign Language Proficiency Foster Migration of Young Individuals within the European Union?*

11 Peter H. Egger and Andrea Lassmann: *Cultural Integration and Export Variety Overlap across Countries*

V Globalization, Inequality, and Politics

12 Stephen May: *Globalization, Language(s), and Mobility*

13 Suzanne Romaine: *Language and Sustainable Development: Integrating the Economics of Language Policy with Poverty Reduction and Biodiversity Conservation*

14 Lauren Zentz: *English on the Rise: Access and Resources in Internationalization*

15 Selma K. Sonntag: *Linguistic Diversity in India's Polity and Economy*

Contributors

Index

(laŭ informo de Bengt-Arne Wickström)

4.3 Aliaj publikigaĵoj

- Fiedler, Sabine (2015): Frequency dictionaries for Esperanto. *Language. Communication. Information* (UAM, Poznań) 9 (2015), p. 155–169. (havebla kiel pdf: http://jki.amu.edu.pl/?pl_2014-tom-x-2015.pdf).
- Jansen, Wim (2016): Derivation in the lexicon: The case of Esperanto. *Linguistics* 54(5), p. 1101–1133.
- Koutny, Ilona (2015): Tipologia karakterizo de Esperanto kiel natura lingvo. *Language. Communication. Information* (UAM, Poznań) 9 (2015), p. 43–62. (havebla kiel pdf: http://jki.amu.edu.pl/?pl_2014-tom-x-2015.pdf).
- Marác, László (2016): Does Global English Support the Development of Social Europe? *Acta Universitatis Sapientiae, European and Regional Studies* 9(1), p. 31–38.
- Meyer, Anna-Maria (2016): Slavic constructed languages. *Language Problems & Language Planning* 40(3), p. 287–315.
- Schubert, Klaus (2016): Barriereabbau durch optimierte Kommunikationsmittel: Versuch einer Systematisierung. En: Nathalie Mälzer (eld.): *Barrierefreie Kommunikation – Perspektiven aus Theorie und Praxis*. (Kommunikation – Partizipation – Inklusion 2.) Berlin: Frank & Timme, p. 15–33
- Schubert, Klaus (2015): ‘so gewiß muß es auch eine Uebersetzungswissenschaft geben’. Erweiterte Recherchen zur ersten Forderung nach einer wissenschaftlichen Beschäftigung mit dem Übersetzen. *trans-kom* 8(2), p. 560–617 – http://www.trans-kom.eu/bd08nr02/trans-kom_08_02_12_Schubert_Pudor3.20151211.pdf.
- Tuider, Bernhard (2015): La Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Historio, havaĵo kaj explorebloj. *Language. Communication. Information* (UAM, Poznań) 9 (2015), p. 184–195. (havebla kiel pdf: http://jki.amu.edu.pl/?pl_2014-tom-x-2015.pdf).
- Wickström, Bengt-Arne (2016): Language Rights: A Welfare-Economics Approach. En: Ginsburgh, Victor et al. (eld.): *The Palgrave Handbook of Economics and Language*, p. 659–688.
- Wickström, Bengt-Arne (2016): English-Only Language Policy: The Road to Provincialism? *Acta Universitatis Sapientiae, European and Regional Studies* 9(1), p. 71–76.
- Wickström, Bengt-Arne et al. (2016): Optimal language policy for the preservation of a minority language. *Mathematical Social Sciences* 81, p. 8–21.

5 Pri la estonteco de IpI

IpI havas longan historion. Ĝi komenciĝis en 1975, kiam la tiama aganta direktoro de CED, Jonathan Pool, per detala raporto en la aprila numero de la revuo *Esperanto* elkizis estontecon de CED kiu en postaj jaroj pli-malpli realiĝis. Inter ĝiaj rekomendoj estis klopodo kunigi kaj kunlaborigi la fakulojn pri interlingvistiko kaj esperantologio: Pool prave opiniis, ke tia kolega kontaktado havus pozitivajn rezultojn kaj pliigus la kvanton kaj kvaliton de studoj kaj aktivadoj interlingvistikaj. Unu maniero realigi tiun kontakton estis lanĉo de laŭokaza *Novaĵletero por Interlingvistoj* sub redakto de Ulrich Lins, kies unuaj du numeroj aperis en la daŭro de 1975 kaj kiu restis esenca kontaktilo dum la cetero de la jardeko. Fakuloj kiuj deziris ricevi la novaĵleteron povis registri sin ĉe la Centra Oficejo de UEA kaj ĝi estis regule sendata al ili senpage. Kiel Pool antaŭvidis, pliboniĝis kaj pliintensiĝis la kunlaboro inter tiuj homoj: la aperigo de la informilo kondukis al fondo de la Esperantologiaj Konferencoj en 1977 – kiuj okazadas ĉiujare seninterrompe ĝis hodiaŭ en la Universala Kongreso de Esperanto. Lanĉiĝis nova serio de la revuo de CED, nun sub la titolo *Lingvaj Problemoj kaj Lingva Planado (LPLP)*. De tiuj tagoj ĝis hodiaŭ, ankaŭ ĝi regule aperadas kaj jam atingis sian 41-an volumon.

En decembro 1983 komencis aperi posteulo de la *Novaĵletero*, nome *Informilo por Interlingvistoj*, sub redakto de konata pola interlingvisto Ryszard Rokicki. Tiun novan serion eldonis kaj

administris en Varsovio la Akademia Centro Interlingvistika. Inter 1983 kaj 1990 aperis 21 numeroj de la *Informilo*, ĉiam sub redakto de Rokicki.

Nova erao komenciĝis en 1992 kiam Detlev Blanke transprenis la redaktadon. Inter tiam kaj sia forpaso en 2016, Blanke redaktis entute 98 numerojn de la informilo, tra 25 jaroj. Baldaŭ li lanĉis paralelan germanlingvan serion, *Interlinguistische Informationen (IntI)*, kiu same daŭris ĝis 2016 kiel organo de GIL, la organizaĵo de germanlingvaj interlingvistoj. Ĉiuj numeroj de *IntI* estas rete alireblaj (interlinguistik-gil.de).

Intertempe la mondo ŝanĝiĝis. Kiam fondiĝis *IpI* kaj ties antaŭulo, la reto estis nur utopia espero, komputiloj estis novaj, pezaj kaj neflekseblaj, kaj la ĉefa ligilo inter interlingvistoj estis presitaj tekstoj kaj poŝtaj servoj. En la nuna jarcento ni eniras novan eraon, kiam regas tuja reta komunikado, sociaj medioj, kaj tekstado. Necesas adapti nin al tiu nova erao.

Sekve, la nuna numero de *IpI*, aperigita omaĝe al nia kara kaj eminenta kolego Detlev, estos la antaŭlasta numero de *IpI* en ties nuna formo. Ekde nun ni transiros al reta komunikado, do ĉesos aperi papera informilo.

En la retejoj de GIL kaj de Esperantic Studies Foundation daŭre aperos informoj similaj al tiuj kiuj ĝis nun aperis en *IpI*. Nia espero estas, ke per kunlaboro inter GIL kaj ESF ni kolektos tiujn informojn de tempo al tempo por formi pliajn numerojn de la informilo – nun plej verŝajne en tri versioj, do ne nur Esperante kaj germane sed ankaŭ angle (*Information for Interlinguists: IfI*). Ni tenos liston de interesatoj kaj informos ilin kiam aperos nova numero trovebla en la reto.

Komence de 2017 aperos speciala centa numero de *IpI* kun indeksoj. Arkivoj kun almenaŭ parta kolekto de *IpI* kaj *IntI* troviĝas en la retejoj de respektive ESF (esperantic.org) kaj GIL (interlinguistik-gil.de).

(Humphrey Tonkin)

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.esperantic.org. ISSN 1385-2191. Ĉi tiun numeron redaktis: Sabine Fiedler, Cyril Brosch (Leipzig) kaj Humphrey Tonkin.

Mendu nur ĉe UEA. Kunlaborantoj el ĉiuj mondaj regionoj bonvenaj. *IpI* riceveblas senpage de UEA.
